Al Amikoj ĉie!

Ĉirkaŭ 20 Amikoj kunvenis en Oslo en la semajnfino 30 septembro ĝis 2 oktobro en konferenco por profundiĝi en la temon *Kristo en la kvakera kredo*. La konferenco estis sekvaĵo de la lastjara konferenco pri kvakera universalismo.

En sia bonveniga parolo Erik Cleven defiis nin per la demando: Kion Kristo malfermas por ni en nia spirita vivo?

Tim Peat el Woodbrooke studcentro demandis, kio estas la aparta starpunkto de la kvakera societo pri la kristokredo kaj kondukis nin malantaŭen al la unua generacio de kvakeroj. Ili vivis en profeta kolektivo kie Kristo povis paroli al ili rekte. ”Kristo mem estas veninta por instrui sian popolon.” Ili spertis Kriston kiel la Lumon kaj la Vorton, kaj la silentan diservon kiel profetan kaj gvidatan de la Spirito.

Samkiel la unuaj kvakeroj, ankaŭ ni vivas en transira epoko, kaj gravas eltrovi kion tio implicas por ni en nia situacio. Ĉu ni kvakeroj havas ion por diri al niaj samtempuloj? Se ni havas ion valoran, kial ni ne diskrias pri ĝi?

Tim Peat enkondukis bildon por ilustri en nova maniero malnovan problemkampon: la rilato inter religiuloj kun esplicite kristana vidpunkto kaj tiuj kiuj vidas la vivon laŭ pli spirita koncepto. Li desegnis por ni ”kristanan” cirklon, kiu reprezentas kaj entenas la diversajn ekleziojn, kaj alian, kiu reprezentas la diverson da spiritaj kaj religiaj vojoj ekflorintaj. Ĉi tiuj cirkloj interkovriĝas, kun malgranda komuna areo. Transverse de tiu areo li desegnis figuron bananforman*, kiu estas kaj ponto kaj kampo, kaj kiu eniras ambaŭ cirklojn kiel organa unuo. Ĉi tiu ”banano” estas bildo de la hodiaŭa kvakera societo, kiu kovras ambaŭ aspektojn de religia sperto, kaj la bildo donas optimisman kaj krean priskribon de nia situacio. Ni ĝojis pri ĉi tiu bildo kaj la maniero en kiu ĝi kunligas kaj defias nin.

Bård Svendsen kunprenis nin sur sia persona vojaĝo, kie Jesuo estis por li, ekde lia infanaĝo, viva ekzemplo de amo al la proksimulo kaj de oferemo. En kristana komuneco ni spertas la apudeston de Kristo en la formo de inkludemo, respekto por aliuloj, amo kaj varmo. Bård montris al ni kiel religio estas sentemo por tio kio estas neesplorebla. La kristanan lingvaĵon oni ne bezonas kompreni kiel esprimon por najlfiksitaj dogmoj, kontraŭe ĝi povas esti deirpunkto por spirita meditado kaj miro kaj povas doni al ni pli profundan personan religian komprenon.

Ni spertis riĉan tempon kune, kun malfermeco, profundo, humuro kaj vasta toleremo. Ni trovis ke ni povas interparoli sendanĝere pri la historia Jesuo kaj pri malsamaj bildoj de Kristo. Serĉante la eternon unu en la alia, ni kapablis komuniki niajn multfacetajn renkontojn kun Jesuo kaj Kristo. Iuj emas vidi Jesuon kiel ekzemplon por niaj vivoj, aliaj emfazas ankaŭ sperton de la interna Kristo. Ni memoris ke George Fox forte substrekis la internan veron kontraste al eksteraj formoj, kaj ni spertis ke en niaj interparoloj kaj en nia kunestado ni sukcesis trovi lokon malantaŭ la vortoj, kie ni sentis fortan kaj profundan komunecon.

Oslo, la duan tagon en la deka monato, 2005

Erik Cleven
sekretario

---

* Sub preparo por publikigo frue en 2006 kiel libreto kun labortitolo *Modelo por kvakera unueco en la diverseco: ”la kvakera banano”* de Timothy Peat kaj Alex Wildwood.